

## & "Monismo":

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 435 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931) kun subtitolo: aŭ meditoj pri senmonaj tempoj. Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:29> (

/Sodo mimi mimi mimi; so fa mi; Sodo mimi mimi mimi; soso fafa mi;

(#Rekantaĵe: fafa mi mido La dodo rere mi; fafa mi mido La dodo TiTi La a)

)×15 )+

### (&Strofoj:

#### ,& Unua parto:

'1 /Jam delonge ĉiu rozo ; Velkis for... ; Estas nun l' apoteozo ; De funebra flor'.

(×:; **Or' en kor', jen la mor' de la riĉa ul' ; sen dolor' vivas por mono malskrupul'.**)

'2 Kiu semis tian semon, ; Mi ne scias, sed malkaŝe ; Mi renkontas "*krizan temon*" ; Sur la vojo ĉiupaŝe. ....

#### ,& Dua parto:

'3 Belaj estis en Borshaloj ; Tiuj baloj kurzofortaj; Ili estas nun *falbaloj* ; Pro la kurzoj senrisortaj. ....

'4 Eĉ la firma ora Pundo ; Falis dum freneza danc' ; Kaj ĝemante pro la vundo ; Kuŝas nun en ambulanc'. ....

'5 Forte staras nun l' idolo ; De l' or-bova Di-Dolar' ; Kaj jam lamas farandolo ; De l' alia idolar'. ....

'6 *Mona ĥino* estas mito ; Elpratempo al ni kara; *Or-Dinaro* – (jes, sen sprito) ; Estas nun *neordinara!* ....

'7 La *Peseto* ne pezegas ; Multe dum finacturnir', ; Kaj post falo oni flegas ; Vundojn de la *kava Lir'*. ....

'8 Ĉu validas plu simbolo, ; Se ĝi estas sen valor'? ; Tial nun... sen *mono polo* ; Frostas en la Koridor'. ....

'9 Kiu havas la or-keston ; Brue ridas tra l' fenestro, ; Ĉar koncerton kaj fastfeston ; Gvidas li, la *or-kest-estro*. ....

'10 Ĉar li havas or-provizon, ; Li nun estas bonhumora, ; Sed li spertos la surprizon: ; Or-provizo... *proviz-ora!* ....

#### ,& Tria parto:

'11 Iam konto en la banko ; Estis certa, fera konto, ; Sed vidiĝis la dorsflanko: ; Nunĝi estas *fe-rakonto*. ....

'12 Kaj akcioj! – Ili havis ; Longajn dentojn kaj kun rentoj ; Manĝis, kion ni ne savis. ; ...Tiaj estas *akci-dentoj!* ....

'13 Ĉiuj belaj tempoj pasis, ; Al ni restas nur paper', ; En la kaso sin amasis ; Lastatempe nur aer'. ....

'14 Per aero, ne per ĉekoj, ; Nun ni pagas ĉiun tagon; Ne novaĵo! Ĉar la grekoj ; Konis jam... l' *aeropagon!* ....

'15 Kun la saĝa Salomono ; Tial ni konkludas nun, ; Ke neniu zorg' pri mono ; "Estas nova sub la sun'." ....)